



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

JARABONO:

Eksterlande: 4 pesetoj
Enlande: 3 pesetoj
Provekzemplero: 1 resp.

ADRESO:

València, 245 - BARCELONA

HALTO SUR LA VOJO

La bedaŭrindaj bataloj, kiuj daŭras en nia lando pro la faŝista ribelo, kiu tiom da sango verŝigas, devigas nin halti sur la vojo dum ni atendas la finon de la milito.

Nia halto por la momento rilatas nur la eldonon de nia gazeto. La komitato de K. E. F. pro militaj postuloj estas parte malpliigita: kelkaj komitatanoj estas sur la batalfronto kaj aliaj pro la nova ekonomia ordo estas tre okupitaj. Ĝi tamen klopodos daŭre subteni la rilatojn inter la enlandaj esperantistoj kaj kapti ĉiun favoran okazon por enkonduki esperanton en ĉiujn mediojn.

Krom tio, ŝajnas, ke nia publika agado devas adaptiĝi al la nova situacio kaj la senkolora enhavo de nia gazeto devas fariĝi pli viva kaj nuntempa. Por tio, kiam la ĉiutaga vivo fariĝos pli normala kaj kvieta, ni vokos niajn membrojn al eksterordinara kunveno kaj tiam ili montros, kiun vojon devas iri K. E. F. Se la federacianoj opinias, ke tiu kunveno devas okazi tuj ne atendante tiun normalecon aluditan, tiam ili sin turnu al ni laŭ tiu senco kaj ni volonte atentos ilian deziron. Dume ni haltas sur la vojo kun la espero, ke en baldaŭa tempo ni povos daŭrigi la iradon.

BONŜANCO

Mi sidas pro puno en la plej malantaŭa benko. Unue mi sidis pro puno en la plej antaŭa, tute apud la stableto, ĉar mi malantaŭe ŝtelrigardis en mian libron. Sed tiam mi ŝtelrigardis antaŭe en la libron de l' instruisto, kiun li ĉe l' demandado pri la leciono, sufiĉe malsaĝe, renversfaligis ĉe l' dikfingroj sur sian ventron, tiel ke mi facile povis legi ĉiujn frazojn renverse..

—Reiru! — li diris.

Tiel mi revenis, kun reirbileto, en la plej malantaŭan benkon.

Dumvoje, dum mi provis vidigi al Kees Klink kaŝtanojn en mia bluzo, vi povis nombri la tuberojn sur mia korpo, mi perdis tri el ili, kiuj rulfalis kun granda bruo ĝis sub la forno...!

La instruisto estis jam kolera kaj iĝis ankoraŭ pli kolera, kiam Kees laŭte rikanis: «Nun ili fritas».

Tiam mi, ne Kees, denove ricevis admonon. Mi opiniis, ke ĉi tio ne estis justa kaj mi bedaŭris la kaŝtanojn.

La instruisto diris: «Mi avertas vin!» Sed ĉi tie malantaŭe mi sidas en sufiĉe sendanĝera loko.

Kiam mi metas miajn piedojn sur la sidilon de Piet Roest, tio signifas sur la sidilon de la benko sur kiu sidas Piet Roest, kaj puŝas, mi balanciĝas tiel agrable kiel en boateto de vapor-karuselo.

La instruisto plilongigas sin ofte sur siaj piedfingroj sur la stableto, por vidi kion mi denove faras, kaj tiam Piet igas sin kiel eble plej larĝa kaj mi min tre malgranda malantaŭ lia dorso.

Ni havas geografion. Mi nenion scias pri ĝi. Ĉar hieraŭ mi kuniris al la teatraĵo «La onklino de Charley», tiel amuza, kaj tien mi tamen ne povis kunporti la geografian libron.

Mi intencis frue ellitiĝi ĉi tiun matenon pro ĝi, sed post bona pripensado, mi opiniis, ke ĉi tio ne estis postulebla de knabo de mia aĝo, kiu enlitiĝis la antaŭan vesperon je la dekunua. La instruisto ankaŭ estis en la teatro, li ridis tute kiel ordinara homo, mi povis vidi lian dorson skuiĝanta. Ekster la lernejo li estas ja agrabla viro, sed ĉi tie estas kvazaŭ li rampas en alian haŭton. Li vidis min hieraŭ. Mi vetas, ke li demandos la lecionon al mi, intence... Jen jam okazas!

—Rikkers.

Estas mi.

—Venu al la karto.

—Mi petas?

Mi demandas tion por gajni tempon kaj prepari min al la malvenko, kiu estas neevitbla.

La instruisto faras signon per la bastono. Mi formetas miajn piedojn de la benko de Piet kaj glitas el la mia.

Kaj promenante tra la benkostrateto, mi atente rigardas la grandan karton de Sud-Ameriko, por iom alkutimiĝi al tiu kolosaĵo. Estas tiel malfeliĉige: el la malproksimo, de mia loko, mi povas diferencigi la punktojn, sed tuj kiam mi staras antaŭ ĝi, suprenrigardas al tiu brilanta ebenaĵo, mi estas tute konfuzita, flugas per la bastono laŭ ĉiuj direktoj de norde orienten, de sude okcidenten, kaj renverse, trans la nepriskribebla miksaĵo de mirinde disĵetitaj literoj, urboj kiel celpunktoj, montaroj similaj al raŭpoj! Mi montras landlimojn anstataŭ riverojn kaj riverojn anstataŭ landlimojn, celas ĉiam maltrafe, ne povas kompreni la sufloradon, kaj havas nur unu ideon: kiel longe ĉi tio ankoraŭ daŭros!

En Sud-Ameriko mi konas nur unu urbon: Buenos-Ayres, tie loĝas kuzo de mi; tio helpas. Mi tiom pensis pri tio, ke mi montris Buenos-Ayres, kvankam la instruisto demandis pri Bahia-sur la supra duono de la karto, laŭ tio kion mi poste eksciis. Poste mi devas montri: Kordova. Pri tio mi tute ne havas elementan konon, kaj krom tio la malfeliĉaĵon senutile sciigi, ke mi ja scias iun en Hispanujo; kio tute ne interesas la instruiston en la leciono pri Sud-Ameriko kaj Kees rikane dirigas: «transloĝiĝis.»

Post kelkaj pli malgravaj eraroj miaflanke la instruisto konkludas: «Vi nenion scias pri ĝi».

Mi nur povas aprobi tion per deca silento.

—Venu ĉi tien, por ke mi vidu kion vi scias pri la produktoj.

Mi alproksimiĝas al la stableto, sed je la malĝusta flanko de l' tableto, tiel ke la malfermita libro, en kiu la instruisto serĉas kion mi devas scii parkere, ne utilas al mi.

—Kio venas el Brazilio?

Brazilio... kiel konate tiu vorto ŝvebas antaŭ mi. Kie mi aŭdis ĝin... Kiu venis de tie? Denove kuzo? Ne... tamen parenco?... Mi memoras: la onklino de Charley! Klare mi ree aŭdas ŝin diri:

—Mi venas el Brazilio, de kie venas la simioj...

—Simioj! — eksplodas triumfe tra mia buŝo el mia sufokiĝa koro.

La instruisto serĉas en la libro, kapsignas fine malforte:

—Ne estas indikite, sed nu... Kio ankoraŭ?

La tuta klaso klopodas komprenigi al mi, kio ankoraŭ tie

kreskas krom simioj, kaj precize tiu konfuza montrado per la lipoj tiel embarasas min.

Fine mi sukcesas decifri unu vorton el la gimnastikaj ekzercoj de Kees Klink:

—Kotono — mi diras kun trafa certeco, ĉar mi bone komprenis.

—Tio estas bona. Kio ankoraŭ? Rapidu!

Mia kapo ektornigas. La frustrado zumas en miaj oreloj.

—Ne sufloru — malpermesas la instruisto. Mi staras kun okuloj, oreloj, nazo kaj buŝo malfermitaj por kapti ion.

—Nu Rikkers, kio venas ankoraŭ el Brazilio krom kotono?

La tento por fini la aferon ja per la nomado de la sola de mi konata artiklo iĝas tro granda por mi.

Mi ripetas denove la pièce de résistance¹:

—Kotono. — Kaj finas humile: — Kaj... kaj la onklino de Charley.

Kees Klink, kiu estis en la teatro, laŭte ekridegas. Kelkaj aliaj knaboj, kiuj ne tiel rapide kapablas memori la produkton, stulte kunridas. Piet Roest, samkiel Kees, agrable memorigataj pri la antaŭa vespero, eksaltas de entuziasmo en sia benko.

En minimumo da tempo mi estas, laŭlonge de Sud-Ameriko, el la klaso, aŭdas ankoraŭ la koleran: «Al la direktoro, tuj al la direktoro!», de la instruisto.

En la malvarmeta koridoro, kun la frapo de la pordo ankoraŭ en miaj oreloj, mi malbenas la onklinon de Charley, plus la simiojn kaj eĉ la senkulpan kotonon. Kia lando Brazilio! Tute ne interesas al mi, kio kreskas tie krom onkloj.

Kiel silente estas en la koridoro! Al la direktoro mi nepre ne iros. Tiu diris:

—Rikkers, se vi ĉi tiun monaton ankoraŭ unufoje estos pelata el kurso, mi malpermesas al vi dum unu semajno la eniron en la lernejon.

Estus nepardonebla stultaĵo, se mi kun tiu verdikto antaŭ la okuloj flugus kiel rostita birdo en lian buŝon. Mi ja restas ĉi tie. Mi havas ankoraŭ kvar kaŝtanojn en mia bluzo, kaj brigigos ilin por pasigi la tempon per mia ĉapo, kiu pendas ĉe la vesthokaro. Je la dekunua mi ja povas iom eniri tiun ŝrankon, ĝis la instruistoj ŝanĝis de klaso kaj la instruisto de geografio sendanĝere preteriris. Poste mi reeniras kvazaŭ Brazilio ne ekzistus en la mondo.

La kaŝtanoj belege brilas. Mi blovas mian spiron sur ilin.

(1) Rezistaĵon (Noto de la tradukintino)

kaj poste forfrotas ĝin, unue per mia ĉapo kaj poste ankoraŭ foje sur mia pantalono.

Du estas pretaj, tiujn mi ree glitigas en mian bluzon. Ĉi tiu estas dika! Hoj! Jen ĝi falas! Jen, jen! la du aliaj ankaŭ... rikketik sur la pavimojn... mi rekaptas ilin!

Je l' ĉielo! jen krakas pordo!... Se estus!... En la ŝrankon... Plene! regimento da kunrulitaj landkartoj, tiuj aĵoj persekutas min! Sube difektitaj pluvŝirmiluĵoj. Mi ne povas eniri. Kio nun! Jes, mi aŭdas paŝojn...

En mia malespero mi saltas malantaŭ la malfermitan ŝrankpordon, premas min al la muro, retenas mian spiron. Mi ŝtelrigardas tra la fendo: estas li! La direktoro! Li iras malrapide kaj legas en kajero. Sed la ŝranko, tute malfermita, kun tiu malordo en si, devas altiri lian atenton. Li haltas apud la fenestro. Kiel malfacile mi spiras, mi ekŝvitas... Nun li denove daŭrigas sian iradon, notas ion per kraĵono en la kajero. Nu, se li tiel preter la ŝranko... Nun mi ne plu povas vidi lin... Sed mi aŭdas... o ve, li serĉas ion en la ŝranko... ĉu mi tenu la pordon per la ŝlosilo?... Tiru pli forte ol li, se eble? Ne, tion mi ne kuraĝas.

La sekvantan momenton okazis. Mi ne precize povas tion rerakonti. Subite estas hele. Mi fermas la okulojn, atendas. En mia mano mi tenas la sole postrestantan kaŝtanon, kiu devas esti bone stufita tie en la varmo, en la alia mian ĉapon. Mi tremetas, ne, mi tremegas! De l' direktoro mi nur vidas la kru-rojn. Sed mi konas lian vizagŝon parkere, ĉi estas ronda, kun, kiam li estas en bona humoro, komikaj malgrandaj okuletoj, kvazaŭ butontruetoj kiam li ridas kaj sulketigas sian nazon, tiel ke liaj oraj okulvitroj tremetas. Sed kiam li faras al iu riproĉon — severe — tiam ili trarigardas vin.

Nu, mi restos senmova, mi ĵa estas nehelpeble perdita... Unu semajno... Kiom panjo ĉagrenos.

—Ĉu vi staras tie malantaŭe, por ke mi ne vidu vin, Rikkers? Lia voĉo sonas malvarmege.

—Bedaŭrinde por vi, ke mi ĵus devis havi ion el tiu ŝranko.

—Jes, sinjoro, tre bedaŭrinde.

—Kial vi tiom timis renkonti min?

—Ĉar vi diris: se vi ankoraŭ unufoje ĉi tiun monaton estos pelata el kurso, vi dum unu semajno... Kaj nun mi esperis, ke vi... preterirus... sed... mi havis malbonŝancon...

—El kia kurso vi denove estas pelita?

—Geografio, sinjoro.

—Kial?

—Unue... mi hazarde — mi malfermas la manon por videbligi la rakonton — faligis kaŝtanojn... kaj poste mi ne sciis, kio kreskas en Brazilio, krom... koton.

—Certe okazis ankoraŭ io pli. Mi deziras la tutan veron, Rikkers.

Mi ja inklinas por rakonti la tutan veron, se mi nur sciis kiel... La direktoro ne iris al la teatro, do mi devus, por bone komprenigi al li la aferon, unue rakonti kiu estis Charley, kiu lia onklino, por tiel alveni al Brazilio kaj la simioj kaj la tuta historio.

—Nu?

Devigite mi do komencas:

—Hieraŭ vespere mi iris al la teatro, tre amuza teatraĵo: «La onklino de Charley». Charley estis studento, kaj tiu havis amikon... tre dikan! Kaj ankaŭ onklinon, kiu devis viziti lin...

La direktoro atente aŭskultas.

—Sed ŝi ne venis — mi diris, por mallongigi la rakonton.

—Ĉu tiu onklino iel koncernas vian konduton de ĉi tiu mateno, se ne vi ŝparu al mi, mi petas, nenecesajn detalojn — petas la direktoro, kaj ŝajnas al mi, ke alia sono ol ĵus antaŭe tremetas en lia voĉo.

Jes, tie sidas ja la nodo, sinjoro. Nun mi daŭrigos mian rakonton. — Post nova, profunda ekspiro mi daŭrigas, revivanta kun en tiaj cirkonstancoj miriga vigleco la agrablan antaŭan vesperon. — Imagu, sinjoro, ĉar la onklino ne venis kaj ili nepre volis havi onklinon, tiu studento, tiu dika, surmetis maljunulajn vestaĵojn kaj ĉapelon kaj perukon kun korktiriloj. Kaj li tiam tiel idiote aspektis, tute kiel... — Simio mi volis diri, sed retenis tion, ĉar pri simioj en lernejo mi tute ne plu volas aŭdi.

—Mi demandis al vi, Rikkers, kio okazis hodiaŭ matene en la geografia kurso, ne hieraŭ en la teatro.

La direktoro evidente ne jam komprenas la interrilaton!

—Pri tio mi tuj parolos. Vidu, tiu onklino, la vera, loĝis en Brazilio, vi ja scias supre en Sud-Ameriko, nu, kaj la geografia leciono ĉi tiun matenon hazarde temis pri Brazilio. — Mi nun sentas, ke mi proksimiĝas al la ĉefa punkto, tie kie mi mem eniras la scenejon, kaj sincere dirite mi iom hezitas pro tio. Mi eble ankoraŭ povas plilongigi la enkondukon:

—O jes — mi diras komplezeme—, mi tion preskaŭ forgesis. Ankaŭ du junulinoj vizitis tiujn studentojn, ili estis invitataj por fari plezuron al la onklino, kaj tiam ili ne sufiĉe frue

povis esti informataj pri ŝia nealveno, ĉu vi komprenas. Kaj tiam ili tute ne rimarkis — la stultulinoj, ĉar oni bone povis vidi tion—, ke tiu maljunulino estis la dika studento!...

—Ridders, mi demandas al vi je l' lasta fojo: kial vi hodiaŭ matene estis pelata el la geografia kurso!

Mi ne vidas elirejon. Honeste plej longe daŭras. Rapide kaj mallaŭte mi balbutas:

—Tiu studento ja ĉiam ekkriis: mi estas la onklino de Charley kaj mi venas el Brazilio de kie venas la simioj. Nu, kaj kiam la instruisto demandis hodiaŭ matene kio kreskas tie, mi diris tuj, ĉar tion mi sciis almenaŭ: «simioj». Kaj «kotonio» mi jam diris. Sed ne sufiĉis jam. La instruisto inistis, kaj mi nenion plu povis eltrovi, kaj tiam... fakte por elirigi min, mi diris... mi diris... mi nun ja bedaŭras... mi diris: la onklino de Charley...

Jen, mi ĉion konfesis. Mia kapo pendas preskaŭ sur miaj genuoj. Mi ne povas imagi kiel aspektas la vizaĝo de l' direktoro...

Daŭras longe. Estas minutoj, estas presite en nia temolibro, kiuj similas eternecojn. Tio estas vere aplikebla. Ho, dum unu semajno almenaŭ mi ne plu povos eniri la lernejon!

Subite mi vidas ion nigran kaj blovan soviĝanta antaŭ mi, grandan malhelan supraĵon.

Kio okazas? Ĉu la lernejo disfalas? Time mi suprenrigardas... Kio estas tio!

La ŝrankpordo estas denove protekte antaŭ mia malfeliĉa persono premita al la muro. Savita mi staras en la malhela trianguleto, tute konfuzita... De malantaŭ la pordo, flegme ĉe l' anguleto, mi neniam en mia vivo forgesos tion, ekaperas vizaĝo, freŝa vizaĝo — kvazaŭ ni ambaŭ havis agrablan rendezueton — kaj, super la oraj okulvitroj, ridas la brilantaj okuletoj. Li ridas! Li skuiĝas! Kiel estas eble! Kia bonŝanco!

—Ridders — mi aŭdas flustri —, vi kaj mi ne vidis hodiaŭ matene unu la alian.

Trad. MARTA VERVLOET

Top Naeff (S-ino A. van Rhijn-Naeff) estas bonfama nederlanda verkistino, kies romanoj *De stille Getuige* (La silenta ĉeestanto), *De Dochter* (La filino), *Vöör de Poort* (Antaŭ la Pordego) kaj *Een Vriendin* (Amikino) estas tre ŝatataj pro sia ĉarma kaj sobra stilo. Ŝi ankaŭ verkis tre bonan libron por kna-

binoj *In den Dop* (En la Ŝelo), la teatraĵojn *De Genadeslag* (La fina Bato) kaj *Aan Flarden* (Disŝirite) kaj estas krom tio klera teatra recenzistino. Ĉi tiu novelo estas ĉerpita el ŝia novelaro *Oogst* (Rikolto). Top Naeff naskiĝis en la jaro 1878-a. — (*Noto de la tradukintino.*)

TRAFLUADO DE LUMO

Matenon de marto, mi trajne veturis ĉe la Riviera. Estis tre frue. Malfacile heliĝis. La ĉielo estis kovrita. La fruktarbara floraro ŝajnis papera. La maron oni vidis oleaspekta. La nebulo estadis kvazaŭ sorĉita sur la montetoj. Malhelajn mienojn, malviglajn ŝultrojn tra la urbetoj trairantajn, oni vidis. Kompatindaj homoj! Estis mateno el tiuj, kiuj haltigas vin, kiam vi estas eklavonta vin; vi haltas dum momento, enpensigeme, rigarde al la lavkuvo. Kaj ne tial, ke vi ion pensas. Sed mankas al vi kuraĝo. La fumaĵo postlasita de vaporŝipo ĉe la horizonto daŭre restadis. La fumkolonetoj el olivarbare kaŝataj farmetoj tute ne disiĝis. Tempaltempe, pepis iu birdo: iomete ĝi pepis kaj poste haltis, dubeme, sur branceto. Iu virino, miksamase vestita, rigardis ĉe fenestro. Se vi ŝin rigardis, ŝi ne respondemis kaj ne ŝajnis kaŝeman malsinceran aspekton: ŝi oscedis.

Eĉ neniun espero pri klariĝo de la peza grizeco ĉiela. La mondo, tedata aŭ kaduka, sendas al ĝi misterajn alfluojn. Al ĝi sin direktis la malvigla fumo de la farmetoj kaj la grandega fajraĵo de la fumo de la ŝipoj. La nebuloj estis por ĝi fortikaj surrokaj subtenoj. Certe grizaj estis, eĉ se subtile, la malfreŝa elfluo de la estaĵoj kaj la elspiraĵo de la homoj, kiuj maŝinece ellitiĝis, kiel la maro pezece grizis, kaj, surtere, cindraspektis la vojetojn.

Mi ne plu restis en la koridoro de la vagono. Mi ekvolis sidi. Sola mi estis en mia apartamento. Mi decidis malteni min, iel malsprita, kvazaŭ mi estus en malsanuleja lito. Miaj okuloj fermiĝis. Mi pensadis: «Certe okazas, ke ĉiuj aferoj sendis siajn ĉarmojn al riparo aŭ repento». Kaj venis al mi memoraĵoj de similaj tagoj aŭ de similaj moralaj situacioj. Tagoj, dum kiuj certaj senmortaj versaĵoj ŝajnis al ni sensignifaj. Tagoj el nia fianĉado, kiam ni diris: «Ĉu kompreneble ke ni

fianĉiĝis? » Tagoj, dum kiuj ni agis laŭ la mekanismo de nia vivo en tia sensubtena kaj senesprima sengajeco, kiun foje estigas la sensanĝa menuo de pensiono.

Io, tamen, ŝmiris miajn palpebrojn per ia renoviĝo. Mi malfermis la okulojn: la luno ekpuŝis flavan kareson. Denove mi alstaris al la koridoro.

Kia translokiĝo! Ĉe la Oriento, iel alte, la ŝtuparo de obtuzaj nuboj, senmove kuntiritaj, fariĝis ia magia kavoj. Ĝia enirkadro, ĝia sojlo, ĝia plafono estis el glacioj helaj kaj traĝutantaj. Sed la gutoj estis nur el lumo. Tiuj glacioj akiradis pli kaj pli intense koloron de genista floro. Kaj ju pli ili orumiĝis, des pli ili estis elverŝemaj. Oni komprenis ke interne de tiu glacia kavoj fariĝis. Tio estis brila fantasmagorio de iu bonfara Ariel. Kaj post la unua blindiĝo, mi rigardis ĉirkaŭen de mi. Orumita estis la fumo el la farmoj, orumita estis la grandega fajraĵo el la vaporŝipo ĉe la horizonto. La vojetoj estis plenaj de stipoj kaj de ŝtonoj, kiuj brilis, la monte-stara nebulo sin kolorigis, la maro estis ormaso, la mienoj de la homoj ŝajnis mildaj kaj sekrete pasiaj. La tero, la aeroj, la maro sendis siajn lumfluojn al la ĉarma kavoj. Subite, la folioj moviĝis, la urbaj stratoj estis gajaj, la olivarboj ridetis, la preskaŭ nigraj palmbranĉoj denove aperis kiel flugiloj.

Poste, la nubarkurteno ree fermiĝis. La suno, tiun tagon, volis nur iom traflui belege. Sed tia trafluo estis eĉ pli ekscita ol plena montriĝo. Ni sciis ke ĝi ne estis mortinta; ĝi nur retiriĝis en sian laborejon por prepari la novajn miraklojn de printempo. Ĝi elprofiladis la dezirojn kaj la esperojn. Ĝi elpretigis la poetojn. Ĝi ellertigis la hirundojn kaj elkalkulis kiom da milionoj da rozoj florigis en nur unu tago.

Oni estis ludinta ridindan rolon. Malvigliĝo ĉiam ludigas ridindan rolon. Kiam ni malvigligas, ni ĉiam kredas ke ni laŭsentas laŭ naturo, laŭ la atmosfero aŭ la historia sorto. Sed fakte la malvigliĝo estas nur en ni. La ŝajna malhelo de la vivo estas nur trompilo por plivalorigi la nepran surprizon. Sed la trompilo trompas nin. Kaj tial estas klasike, ke feliĉo renkontas nin ĉiam, ke ni stulte mienas.


El la kataluna trad.

DELFI DALMAU L. K.


PRI LA MALJUNIĜO

Moto, : Certe.


Se ni povas prezenti al ni la vivon kiel veturilon, tiam ni konstatos, ke dum la unua jardeko unu ĉevalo, dum la dua du cevaloj, dum la tria tri ĉevaloj tiras nian ĉaron. Kaj se ni en la kvara jardeko kun kvar ĉevaloj veturas, tiam la veturado estas duoble rapida rilate al la periodo antaŭ dudek jaroj, kiam ni sopiris pli rapidan troton. Kaj fine ni ne plu kapablas prokrasti la rapidegan galopadon de nia ĉaro, kiu per konstante kreskanta rapidemo alportas nin al nia lasta celo.




Se la naskiĝtagoj estus mejloŝtonoj sur nia vivovojo, ili en la lasta periodo de nia vivo tiel malfirme sidus en la tero, ke ĉiu rabisto per unu sola movo povus levi ilin kaj mortigi nin per la ŝtonoj. Efektive la naskiĝtagoj komence estas promesoj, pli malfrue admonoj kaj fine eĉ minacoj.




Ni eble ne rimarkus ke ni maljuniĝas, se ne la infanoj apud ni havus la arogantecon pligrandiĝi.



La vivo ŝajnas al ni multe tro mallonga por utiligi la spertojn, kiujn suferi ĝi ŝajnas al ni multe tro longa.




Ju pli maljuna, des pli malgranda la formato de niaj leteroj. Bezonante grandajn foliojn por deklari nian amon, oni al aliulo povas diri sian opinion sur peceto de papero.




La kritikaj jaroj de la viro estas tiam, kiam la prudento prezentas la rimesojn, kiujn iam tratis lia pasio.



Kelkaj homoj neniam muljuniĝas, ĉar ili neniam estis junaj.




Oni ne maljuniĝas laŭ la leĝoj de la kalendaro, sed laŭ la leĝoj de sia animo.




Kiam ni vane povas konservi certan monsumon; kiam post


la unuaj perdoj la postuloj al nia malgranda trezoro fariĝas konstante pli grandaj kaj pli urgaj; kiam fine la pacienco ŝpari nin forlasas kaj ni volonte elspezas kaj eĉ malŝparas la lastajn restaĵojn de nia havaĵo, unike por forigi la zorgon kaj la ĉaĝrenon pro ĝia vaneco: tiam tio estu al ni instruo kaj konsolo por tiu malfrua epoko, kiun ni hodiaŭ timas kaj kiun ni iam trankvile travivos kiel la lastan restaĵon de havaĵo, per kiu ni, kvankam ĝi estis tre malgranda, klopodis nian porvivon.




Kiom ja estus da ĝuoj, se ni ne devus pagi la ekkonojn per la spertoj, la vivosaĝecon per la vivoforto!




Tiom longe kiom ni havas ankoraŭ okulon por la belaĵoj de la mondo, ni ne movu okulharon vidante la morton!



Oni ne povas haltigi la tempon. Sed memorante oni povas ĝin denove travivi.



Je kvardek jaroj estas preskaŭ tro malfrue — sed je kvindek oni facile povas rekomenci.



Lasu min fariĝi okdekjara! Mi tiam certe ankoraŭ trovos naŭdekjarulon, al kiu mi montros la langon, por ke li diru al mi «Bubo»!

JACOB SCHMID

BIBLIOGRAFIO

Kudlago, la malgranda eskimo. De N. van Hichtum. El la holanda lingvo tradukis S. D. Mannoury. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 40 paĝ. Prezo 0'75 sved. kr.

Jen libreto por novuloj kaj junuloj, kiun ili kun ĝojo kaj utilo legos. La simpla, reala rakonto pri la simpatia eskima bubo Kudlago vekos nian simpatian por li kaj lia popolo. La leganto ekscias multon pri la vivado kaj moroj ĉe la eskimoj,

ni vidas kiel Kudlago ĉasas fokojn kaj ursojn, kiel li kaj lia patro konstruas boaton kaj sledon, kiel ili batalas kontraŭ neĝo kaj glacio, frostoj kaj ŝtormoj, sed ankaŭ kiel ili kun siaj najbaroj ĝojas kaj festas.

Tamen — brile la verkisto pentras la amon kiun havas la eskimoj al sia, laŭ nia opinio, malagrable, lando. Kudlago ne volas forlasi ĝin por veturo al pli sudaj landoj, ĉar li ne volas malhavi la ĝojon, kiun donas al li ĉasado, aŭ la frandaĵon, kiun reprezentas la graso de ĵus kaptita foko.

La lingvaĵo estas glata, kaj oni plene povas rekomendi la libron al komencantoj kiel ankaŭ al pli lertaj esperantistoj, kiuj deziras sin distri per legado de interesa rakonto.

La kovrilo prezentas tutpaĝan originalan bildon de la malgranda Kudlago kaptanta fiŝojn.

L. Sinha: *Hindo rigardas Svedlandon*. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. 1. 200 paĝ. Prezo: broŝ. 3'75, bind. 5, — sved. kr.

Dum la lastaj jaroj oni renkontis en la esperanta gazetaro ofte la nomon de Lakshmiswar Sinha. Plej ofte la kronikoj rakontis pri liaj sukcesaj prelegoj en Svedlando, sed li vizitis ankaŭ aliajn eŭropajn landojn, eĉ Islandon kaj la Feroajn Insulojn.

S-ro Sinha antaŭ kelkaj jaroj venis Svedlandon por tie studi svedan slojdon. Hazarde li konatiĝis kun Esperanto kaj lernis ĝin. Per tio li ricevis multajn amikojn svedajn, kaj oni petis lin fari antaŭ esperanta publiko prelegojn pri sia interesplena hejmlando. Tion li ankaŭ faris, kaj la famo de la nova hinda samideano disvastiĝis rapide tra la lando. La sekretario de la landa asocio organizis prelegvojaĝojn, kaj s-ro Sinha kelkfoje traveturis kiel prelegisto la vastan landon.

Post kelktempa restado en sia hejmlando li denove venis Svedlandon, kie li estis plej kore salutata de la esperantistoj. Kvankam li volis sin dediĉi nur al studoj pri la lando kaj precipe ĝia slojdo, li devis denove fari prelegvojaĝojn. Antaŭ sia reveturo al la hejmlando en la malproksima oriento li volis esprimi sian simpatian al Svedlando kaj ĝia popolo. Pro tio li nun verkis libron, kiu ricevis la titolon «Hindo rigardas Svedlandon». La aŭtoro montras en ĝi, ke li tre bone konas la landon kaj ĝian popolon. Li vizitis ĉiujn provincojn kaj kun granda amo li priskribas ilian variantan naturbelecon kiel ankaŭ la amindajn ecojn de la popolo. Post nelonga enkonduka ĉapitro kun ĝeneralaj informoj pri Svedlando kaj ĝia ekonomia

vivo sekvas ĉapitroj pri Stockholm kaj lokoj ĉirkaŭ la lago Mälaren, Gotlando — la estinta reĝino de Balta Maro, Dalar-na — la koro de Svedlando, Vermland — la lando de Gösta Berling, Småland kun la urbo de alumetoj k. t. p. Li priskribas vizitojn ĉe fiŝistoj kaj ĉe laponoj, plej nordaj loĝantoj de la lando. En du tre interesaj ĉapitroj la aŭtoro vigle priskribas la svedan slojdon kaj svedajn morojn kaj kutimojn, kiujn li trovis rimarkindaj.

Antaŭparolon verkis la profesoro ĉe la Universitato en Uppsala Björn Collinder.

La interesan kaj je faktoj tre riĉan libron plibeligas ne malpli ol 128 bildoj.

La libro de Sinha sendube kaptos la intereson de la esperantistoj en ĉiuj landoj. Estas maloftaĵo ke orientano tiel serioze studas la naturon kaj kulturan vivon de okcidenta lando, ke li poste kapablas verki riĉenhavan libron pri la temo, kaj en la historio de la esperanta literaturo tio estas ĝis nun unikaĵo.

Katalogon pri originalaj aŭ tradukitaj verkoj en Esperanto eldonis El. Soc. Esperanto, Stockholm. 1. Inter la plej gravaj verkoj en la katalogo estas Sveda Antologio, Gösta Berling (de Selma Lagerlöf), la nova libro pri Svedlando verkita de Lakshmiswar Sinha, k. c. La katalogo estas ricevebla rekte de la eldonejo aŭ el la ĉefaj esperantolibrejoj en diversaj landoj.

Eldonoj de «Sennacieca Asocio Tutmonda» 67, Avenue Gambetta, Paris 20:

«Komunista manifesto», 3-a eldono. Aŭtoroj: Karlo Marks kaj Frederiko Engels. Kun tre aktuala antaŭparolo de la konata ekonomiisto Lucien Lora (Revo). La lingvo de l' tria eldono estas zorge revizita.

56 paĝoj, formato 12×18 cm.

Prezo: 3 fr. fr. (plus 10% por afranko).

«Juneca Ardo», originala rakonto de N. Bartelmes, kiu priskribas en romana formo la vivon de du junuloj el la jaroj post la mondmilito. Serenaj bildoj alternas kun malserenaj, dum revolucia fono flagre lumigas la scenejon.

120 paĝoj, formato 13×19 cm., kun tutpaĝa titolbildo.

prezo: 7'50 fr. fr. (plus 10% por afranko).

«La Laborista Esperanto-movado antaŭ la mondmilito». His-

toria skizo de G. P. De Bruin. — Sobra stilo, klara prezent-
maniero, pri temo, kiu devus interesi ĉiun esperantiston.

36 paĝoj, formato 14×20 cm.

Prezo 4. fr. fr. (plus 10% por afranko).

«Frateco en la vivpraktiko». — Aŭtoro: Henrieta Roland
Holst-v. d. Schalk. Tradukis H. A. Buis el la nederlanda
lingvo. Prezento de la socia idealo de noble pensanta virino.

28 paĝoj, formato 11×15 cm.

Prezo: 1'50 fr. fr. (plus 10% por afranko).

EN VOJKRUCIĜO

Mi jam venas el la vivo,
vi ekiras al la viv'.

Amikin', mi vin salutas,
de du vojoj en kruciĝ'.

Estas via rev' pri ombroj,
kiuj venos morgaŭ, ĉu?

Mi aliajn ombrojn revas,
kiuj ne revenos plu.

Amis min okuloj tiaj,
kiajn havas ĝuste vi...
Ĉu ni haltu, nur momenton,
de du vojoj en kruciĝ'?

Kia paco! Ni ĝin spiru.
Taga lumo flugis for.
Kiel taŭgas la mallumo
al la revoj de la kor'!

En mi brilas la okuloj,
se jam velkis korpa ĝu'.
Ni atendu, en silento,
ĝis aŭdigos dolĉa bru':

de folio, por mi, seka,
kiun vento pelas for;
de la paŝo, por vi, milda
de l' amant' de via kor'.

JOSEF CARNER

El la kataluna trad. JAUME GRAU CASAS

INAŬGURO DE LA IEL-DOMO

Sabaton posttagmeze, la 12an de decembro, interrompis la trankvilecon de la angla kamparo, tridek kilometrojn nord-okcidente de Londono, la alveno per ĉiu speco de veturilo, el ĉiuj partoj de Britujo, de sesdeko da Esperantistoj, kunvenintaj por la inaŭguro de la nova Esperanto-Domo en Heronsgate, apud Rickmansworth, kiu de nun estas la centro de nia tutmonda movado.

En la administra oficejo de I. E. L., la Prezidanto, sinjoro Louis Bastien, veninta speciale el Parizo por la soleno, prenis la parolon por diri le jenajn vortojn :

«Hodiaŭ ni inaŭguras la domon, kiun donacis grandanimaj bonfarantoj. Ili volas resti nekonataj de la Esperantistaro; ni respektu ilian deziron.

» Sed mia unua parolo estu danko al ili, je la nomo de ĉiuj samideanoj. Vi povas konstati, kiel bela, komforta, oportuna estas tiu ĉi domo, ĉirkaŭata de granda, agrabla ĝardeno. Tiu ilia gesto rekte atingis nian koron, ĉar ni komprenis, kiu profunda idealo gvidis ilin; ĝi estas la idealo, kiu kuŝas en la koro de ĉiu vera esperantisto, kaj tial nia danko estas duobla: danko pro la donacitaĵo, danko pro la sento, kiu instigis ilin. Franca proverbo diras: «La maniero donaci valoras pli ol la donaco mem»; tial la sento, kiu gvidis ilian geston, tuŝas nin ankoraŭ pli ol la gesto mem. Estu certaj, karaj bonfarantoj, ke ni skrupule agos laŭ viaj intencoj, kaj ke tiu ĉi domo estos domo de paca, fruktodona laboro por nia komuna idealo.

» Same kiel animo loĝigas sin en korpon por komenci vivon, nia Centra Organizo ricevas loĝejon en la momento mem, kiam ĝi komencas sian novan vivon. Al tiu loĝejo ni alportos la animon. Ĝi fariĝos la impulsa centro, kiu unuigos la agadon de ĉiuj niaj Landaj Asocioj. En tiu ĉi momento, kiam ni kons-tatas la nepridubebajn progresojn, kiujn faras en la publika spirito la ideo pri internacia lingvo, tiu komuna impulso fariĝas pli necesa ol iam ajn. Grandega estas nia tasko. Jam en Parizo oni preparas internacian konferencon pri «Esperanto en la Moderna Vivo», kiu okazos dum Pentekosto ĉe la Pariza Ekspozicio. Tiu konferenco, kiu jam kunigas — kaj kunigos — fame konatajn personojn, devos porti multajn fruktojn, se ni kapablos ekspluati ĝian atenditan sukceson. Jen unu bela tasko, kiu sin prezentas al ni; ni trovos multajn aliajn okazojn por labori sur la internacia kampo, kaj tiamaniere nia Centra Oficejo, kiu ĝis nun ludis tre modestan rolon, fariĝos vere

la animo, la centra movilo, kiu puŝos niajn verdajn trupojn al la fina triumfo.

»Kiam ni transportis ĝin de Ĝenevo al Londono, kelkaj timis, ke ĝi perdos la spiriton de la fondinto de U. E. A. kaj de la Majstro mem. Tiu spirito ne apartenas al tiu ĉi aŭ tiu lando; ĝi estas komuna propraĵo de ĉiuj Esperantistoj, en kiu ajn lando ili loĝas. Ĝi povas prosperi en Anglujo tiel bone, kiel aliloke, kaj pruvo estas, ke la Brita Asocio fariĝis unu el niaj plej prosperaj organizoj. Mi estas konvinkita, ke, sub la lerta gvidado de nia Ĝenerala Sekretario, s-ro Goldsmith, kiu jam de longe montris sian kapablon, nia Centra Oficejo respondos al la komuna deziro de la Landaj Asocioj.

»Kuraĝon do, karaj samideanoj, kaj ĉiam antaŭen! Ne ĉiuj povas fari gravan donacon; sed ĉiuj povas dediĉi pli-malpli da tempo kaj klopodoj al nia kara afero. Tio estas la plej taŭga maniero respondi al la intencoj de niaj donacintoj!

»Nova epoko komenciĝas por nia movado; ĝi estu grandioza! En tiu ĉi domo laboru, prosperu kaj venku la Internacia Esperanto-Ligo!»

La ĝeestantoj, inter kiuj estis la malavaraĵoj donacintoj, eliras en la ĝardenon, kie s-ro Bastien hisis la Verdajn Standardojn, esprimante la deziron, ke ĝi ŝvebu tie ĝis la fina triumfo.

Dankon al la Prezidanto esprimis s-ro G. D. Buchanan, Prezidanto de B. E. A., kaj post paroladetoj de s-roj Blaise, Oliver, Robertson kaj Wadham la kunvenintoj esploris la domon kaj la ĝardenon, kaj ĝuis teon laŭ la gastama aranĝo de gesinjoroj Goldsmith.

Salutajn telegramojn oni ricevis de diversaj grupoj kaj individuoj kaj leterojn de s-ro E. Malmgren, por la propaganda filio de I. E. L. en Stokholmo, kaj de s-ro Teo Jung por la redakcio de la oficialaj gazetoj en Scheveningen.

DAŬRIGA VOLUMO DE ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO

Estas plenforte redaktata kaj aperos en la jaro 1938. Por posedantoj de la unuaj du volumoj la eldonejo ebligas favorprezan aĉeton al la tria volumo kaj pro tio ĝi sendis detalan ofertan al ĉiuj el ili. Se iu posedanto ne ricevas tian ofertan ĝis la 1-a de januaro, bonvolu pri tio skribi rekte al la «Eldonejo Literatura Mondo. Budapeŝto, IX».

Imprenta «La Renaixença», Xuclà, 13 - Barcelona



Curs Complet de la Llengua Auxiliar Internacional Esperanto

per Jaume Grau Casas

*La millor gramàtica en català
de la llengua Esperanto. Em-
pren-la en tots els curssets!*

Preu: 3'50 pessetes

Adreceu-vos a la Redacció de "Kataluna Esperantisto"

Dank'al la klopodoj de
Kataluna Esperan-
tista Federacio, aperis
jam tri serioj de bild-
kartoj kun teksto en
esperanto.

Aperis jam serioj de

TARRAGONA
PALMA DE MALLORCA
BARCELONA

ELDONITAJ DE LA FAMA

ZERKOWITZ

K. E. F. povas ilin havigi
al vi je tre favoraj prezoj.

Mendu tuĵ!

ESTATUTS DE LA FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA

Art. 1. L'agrupació general d'esperantistes en terres de llengua catalana, es dirà FEDERACIÓ ESPERANTISTA CATALANA, i, en esperanto, KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO (K. E. F.).

Art. 2. La finalitat de la Federació Esperantista Catalana, és la unió d'entitats i individus esperantistes en terres de llengua catalana per a la divulgació i propaganda de l'Esperanto, i, també, donar compliment als acords i Consells que afectin la collectivitat, procedents dels Congressos Internacionals o dels nuclis directors de la llengua del doctor Zamenhof.

La Federació Esperantista Catalana, sempre que les circumstàncies econòmiques li ho permetin, s'adherirà, pagant la quota corresponent, a la «Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj».

Art. 3. La Federació Esperantista Catalana estarà integrada de membres actius i protectors.

Per a la classificació dels actius, caldrà tenir en compte el que se segueix:

Els socis actius seran dividits en socis collectius i individuals.

Els socis actius pagaran, per mitjà de l'entitat llur i per cadascun dels socis que aquesta tingui, una quota de 0,30 ptes. trimestrals.

Els socis individuals que acreditin pertànyer a una entitat esperantista, no adherida a la Federació, pagaran solament una quota de 1'20 ptes. anuals.

Els socis individuals pagaran una quota de dues pessetes amb cinquanta cèntims anuals.

Els socis protectors (individus o entitats), pagaran una quota de 12 ptes. anuals com a mínimum (1).

Art. 4. La Federació Esperantista Catalana, estarà regida per una Junta renovable cada any, composta de: President, vice-President, Secretari, vice-Secretari, Caixaer, Comptador, Bibliotecari i dos vocals.

Art. 5. La Junta de la Federació Esperantista Catalana convocarà, almenys un cop cada any, si és possible en diferents localitats, durant la primavera i en dia festiu, els seus associats en Assemblea o Congrés general, en el qual, previ l'ordre del dia, es donarà compte als federats dels treballs i gestions fets pel referit Comitè Directiu durant el temps del seu exercici; serà acordat, si és possible, el lloc on s'haurà de celebrar el pròxim Congrés o Assemblea; seran nomenats els individus que hauran de formar part de la Junta per al següent exercici i hom discutirà les proposicions que hagin estat presentades 30 dies abans del Congrés o Assemblea, i, si és possible, que hagin estat publicades a la revista i incloses en l'ordre del dia.

Art. 6. La Junta permetrà la constitució de seccions dintre de la Federació.

Aquestes seccions, que podran ésser de caràcter ben autònom, hauran de regir-se per un Reglament interior en el qual siguin cedit, com a mínimum, dos càrrecs, en els corresponents Comitès de Secció, al Comitè Directiu de la Federació.

Art. 7. Tots els acords de les Assemblees o Congressos seran presos per majoria de vots dels socis assistents. Les modificacions que puguin ésser presentades a aquest Reglament, hauran d'ésser-ho amb l'antelació deguda a fi d'incloure-les en l'ordre del dia i estar publicades en la seva totalitat, puix que solament podran ésser discutides i estudiades en les Assemblees o Congressos generals.

Art. 8. Tots els socis actius, individuals o collectius, tindran veu i vot en les Assemblees o Congressos generals on assisteixen.

Art. 9. Aquesta Federació Esperantista Catalana podrà actuar mentre tingui adherides dues entitats o 30 membres individuals. En cas de dissolució, previ acord de la Federació Esperantista Catalana, els fons existents o que resultin de la liquidació, passaran a la «Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado» domiciliada a Ginebra, per a la propaganda de l'Esperanto. Si aquesta entitat central no existia en els moments de la dissolució, podrà, la Junta General de socis, acordar la destinació dels fons i objectes en existència.

Article transitori. La Federació Esperantista Catalana estarà domiciliada a Barcelona, carrer València, 245, entresol.

Barcelona, 6 d'agost del 1930.

(1) Tots els socis pagaran a més ptes. 1'25 anuals per la quota d'U. E. A.